

\*\*\*\*\*

## INSTRU-CIRKULERO 2018/01 (aprilo 2018)

Neregula informilo pri E-instruado, novaĵoj, projektoj, renkontiĝoj

\*\*\*\*\*

Per tiu ĉi informilo ni peras interesaĵojn pri instruado, pri eventoj rilate al kursoj, klerigado kaj alvokojn, novaĵojn en 2018.

### AGEI-jarĉefkunveno, Germana Esperanto-Kongreso

La **AGEI-jarĉefkunveno** okazos, kiel kutime, dum la Germana Esperanto-Kongreso (GEK).

#### Einladung: VDEL-AGEI Mitgliederversammlung

Der Verband Deutscher Esperanto-Lehrer (VDEL-AGEI) lädt zu seiner jährlichen Mitgliederversammlung im Rahmen des 95. Deutschen Esperanto-Kongresses\* (18.05-21.05.2018) in Zweibrücken ein. (\*Dreiländer Esperanto-Kongress: 95. Deutscher Esperanto-Kongress und Französischer Esperanto-Kongress und Luxemburger Esperanto-Kongress.

Thema: Esperanto global vernetzt). Link: <https://www.esperanto.de/de/enhavo/willkommen>

Diese findet **am Sonntag, den 20. Mai 2018** in der Hochschule (66482 Zweibrücken/Pfalz) statt.

Adresse: Amerikastraße 1, 66482 Zweibrücken/Pfalz, LKK: Telefon +49-(0)6332 -981190 oder +49-0151 250 96448, Fax: +49-(0)6332 98 11 92, Email: [95aGEK@esperanto-reto.eu](mailto:95aGEK@esperanto-reto.eu)

Beginn ist um **13:30 Uhr**.

Neben Berichten über die Arbeit des vergangenen Jahres sind Diskussionen über die weitere Arbeit des Verbandes zu erwarten und ausdrücklich erwünscht. Der Vorstand erwartet daher eine rege Teilnahme der Mitglieder.

#### Invito al: Jarĉefkunveno de AGEI

La Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj (AGEI) invitas ĉiujn siajn membrojn al la ĉi-jara ĉefkunsido, okazonta enkadre de la Trilanda Esperanto-Kongreso (95a Germana Esperanto-Kongreso kaj Franca Esperanto-Kongreso kaj Luksemburga Esperanto-Kongreso) en Zweibrücken, inter 18-25.05.2018.

Temo: Esperanto tutmonde ligita. <https://www.esperanto.de/eo/enhavo/bonvenon-0>

La AGEI-kunveno komenciĝos je **13:30 la 20-an de majo 2018 en la Altlernejo** Zweibrücken.

Proponata tagordo:

1. elekto de la gvidanto de la kunsido. Salutado, malfermo. Elekto de protokolanto, kontrolo de laŭstatuta invito kaj decidpovo
2. decido pri la tagordo
3. raportoj de la kasisto kaj la kasrevizoroj
4. raporto de la estraro. Malŝarĝigo de la estraro
5. elekto de estraro
6. informado, diskutado pri edukrilataj projektoj
7. pluaj aktivecoj kaj proponoj
8. laborplano por la sekva agadjarco. Decido pri loko kaj dato de la sekva jarĉefkunveno.
9. diversajoj

Koran bonvenon!

Kun multaj salutoj kaj danko al ĉiuj, kiuj per membreco kaj agado subtenas nian asocion,

Zsófia Kóródy

Zsófia Kóródy  
AGEI-Vorsitzende  
AGEI-prezidanto



Instruado de Esperanto estas grava tasko por la disvastigado de nia lingvo. Do, ni invitas ĉiujn interesiĝantojn al la kunveno de AGEI por konatiĝi kun la gvidantoj kaj gekolegoj, por interŝanĝi spertojn, por pridiskuti instrumetodojn, tradiciajn kaj modernajn lerneblojn, ofertojn al diversaj celgrupoj kaj preparoli planojn por la sekvaj jaroj.

## 1. EKZAMENOJ

1.1. Ni ofertas **UEA/KER-ekzamenojn** dum la kongreso, se estos sufiĉaj interesiĝantoj. Nepras aliĝi semajnojn antaŭ la kongreso ĉe <https://edukado.net/alighilo?id=2018DE-ZWEI>

Eblos elekti t.n. kompleksan (skriban kaj parolan) ekzamenojn en B1, B2 kaj C1 niveloj.

Jen lasta ŝanco por tiuj, kiuj ŝatus trapasi KER-ekzamenon nun en majo en Germanio.

Jam estas 4 interesiĝantoj, sed por organizi memstaran sesion, devus esti pli da kandidatoj.

Kotizoj: <https://edukado.net/ekzamenoj/ker/kotizoj>

Specimenaj testoj: <https://edukado.net/ekzamenoj/ker/specimenoj>

**Testlibro** kun po 2 ellaboritaj KER-testoj en ĉiuj 3 niveloj, kun solvo estas mendebla de [zsofia.korody@esperanto.de](mailto:zsofia.korody@esperanto.de). Bv. kontakti min, se vi havas demandojn, bezonos kromajn informojn.

1.2. Ni ofertas **GEI-ekzamenojn** en 14-15 julio 2018 en Herzberg am Harz en tri niveloj: kursfinan ekzamenon, ekzamenojn pri lingva kapableco (mezan kaj superan), se estos sufiĉaj kandidatoj. Bv. aliĝi kun indiko de la elektita nivelo ĝis 31.05.2018 ĉe [esperanto-zentrum@web.de](mailto:esperanto-zentrum@web.de)

## 2. KURSOJ, KLERIGADO

2.1. Por lingvolernado, perfektigo ni rekomendas ankaŭ la lingvokursojn kaj studseminariojn de Germana Esperanto-Centro/Interkultura Centro Herzberg (ICH) en Herzberg am Harz.

Jen kelkaj kursdatoj:

- ▶ **junio 28-julio 01: 81a GEA-Studsesio**, modulo pri movadhistorio, informado, gazetara laboro, lingvopolitiko, ktp.
- ▶ **julio 01-08 kaj julio 08-15: SEP-3: Somera Esperanto-Perfektigo** dum 2x1 semajnoj: intensa lingvolernado, konversaciado por infanoj, gejunuloj, plenkreskuloj. Ekskursoj per biciklo, trajno kaj piede, diskutado pri aktualaĵoj, konatiĝo kun Esperanto-literaturo kaj la biblioteko de la Esperanto-Centro, kulturaj programeroj
- ▶ **septembro 28 - oktobro 03: TORPEDO 13: Pedagogiaj Tagoj (AGEI, GEA)**, prelegoj, prezentadoj, spertinterŝanĝo pri instruado de Esperanto  
**82a GEA-Studsesio**, modulo pri metodiko, didaktiko, instrukapabligo
- ▶ **novembro 09-11: Intensa semajnfina lingvokurso** por komencantoj, komencintoj kaj konversaciemuloj (A1, A2, B1, B2)
- ▶ **decembro 14-16: 83a GEA-Studsesio**, modulo pri Esperanto-literaturo, historio, movado, organizado, varbado. Tradicia Zamenhof-festo en 15.12.2018

Atingis min kursalvokoj kaj klubkunvenoj de kelkaj gekolegoj:

### 2.2. Münster/Vestfalujo

La Esperanto-societo Monastera invitis post longa paŭzo al nova Esperanto-kurso por komencantoj. Temas pri 4 jaŭdaj vesperoj (18h15 ĝis 19h45) ĉe Sozialpädagogisches Bildungswerk (Sobi e.V.), Achtermannstr. 10-12, proksime al la ĉefstacidomo. Kotizoj: 10 EUR.

Gvidanto: Rudolf Fischer. Lernolibro: Esperanto en dialogo <http://agei.esperanto-urbo.de/netzkurs>.

Aliĝoj al: Rudolf Fischer [fischru@uni-muenster.de](mailto:fischru@uni-muenster.de), Tel: 02573 626

Bv. diskonigi tiun ĉi informon al interesatoj kaj konatoj ĉirkaŭ Münster, krome en Fejsbuko ktp., do viaj forumoj en la reto. Post sukcesa kurso eblos daŭrigo. Atentu, ke la Esperanto-societo Monastera krome dufoje monate kunvenas merkrede je la 18a ankaŭ en Achtermannstraße, sed n-ro 24. Detaloj ĉe [www.esperanto.de/muenster](http://www.esperanto.de/muenster)

### 2.3. Neue Esperantokurse in Nürnberg

Nach den erfolgreichen Kursen im Frühjahr finden im April und Juni 2018 wieder Wochenendkurse nach dem Lehrbuch "Tesi - la testudo" in Nürnberg statt.

**08.-10.06.2018:** Übungskurs für Fortgeschrittene. Dieser Kurs richtet sich an alle Lernenden, welche die Grundzüge der Sprache (Grammatik, Basiswortschatz usw.) bereits kennengelernt haben und nun noch etwas üben möchten.

Mit freundlichen Grüßen: Alexander Neuhaus, Esperanto-Gruppe Nürnberg e.V.

<http://www.esperanto-nuernberg.de/>

### 3. BILDUNGSURLAUB ESPERANTO

Inter 5-9 marto 2018 en kunlaboro kun VHS Göttingen/Osterode sukcese estis organizita **Intensa tutsemajna lingvokurso kiel agnoskita VHS-Bildungsurlaub** en la Esperanto-Centro en Herzberg.

Ĝin partoprenis 7 personoj sub la faka gvido de Peter Zilvar kaj Zsófia Kóródy. La kursanoj ricevis oficialan atestilon de la Popolaltlernejo (Volkshochschule) pri la partopreno.

Ni povos plani novan kurson kun VHS en tiu sama formo en 2019, se montriĝas intereso. Bv. pludoni informon pri ĝi kaj varbi novajn kursanojn!

### 4. LERNEJOJ

Bedaŭrinde denove mi ne povas raporti pri multaj lernejoj kursoj, ja atingis min neniun informon el aliaj urboj. Jen, do novaĵoj el Herzberg am Harz, kie mi ofertas posttagmezajn fakrondojn (AG).

4.1. En la **bazlernejo Nicolai** en la aŭtuna duonjaro okazis Esperanto-lernrondo por infanoj de la 1-4 klasoj. La plimulto de ili devenis el familioj de rifuĝintoj kaj luktis lerni la germanan lingvon. Ili havis malfacilaĵojn integriĝi en la regulan lernejan instruadon ankaŭ pro siaj manko de edukiteco kaj socia kondutmaniero.

En la dua duonjaro mi ne plu ofertis Esperanto-kurson en la lernejo.

4.2. **En la EMA-Gimnazio en Herzberg am Harz** en la unua duonjaro, de septembro ĝis februaro ĉiusemajne okazis 2-hora Esperanto-leciono. Entuziasme partoprenis kaj rapide lernis du lernantoj el la 5a kaj 6a klasoj kaj neregule partoprenis kelkaj aliaj gelernantoj.

Antaŭ la komenco de la dua duonjaro okazis aparta **informhoro por ĉiuj lernantoj de la 5a kaj 6a klasoj** pri posttagmezaj okupoj, libere elekteblaj fakoj. Al la evento – dank' al la bona kunlaboro inter la gimnazio kaj Interkultura Centro Herzberg – ni ricevis inviton por prezenti Esperanton, ja ni denove planis oferti Esperanto-fakrondon.

En la informhoro **partoprenis ĉ.170 gelernantoj kaj iliaj instruistoj**. Inter ili estis lernantino, kiu en somero 2017 jam ĉeestis feriotempan Esperanto-kurseton en la Esperanto-Centro, tamen bedaŭrinde neniun elektis Esperanton en tiu duonjaro, do momente paŭzas instruado tie.

#### 4.3. Lernejo en Francio serĉas partnerlernejon en Germanio

Temas pri tuta klaso, ĉ. 30 infanoj en la 5-a klaso. La plej multaj lernas la germanan, kelkaj la anglan, krome ili lernas Esperanton de unu jaro kaj serĉas partnerojn por korespondado, interkonatiĝo, kultura kaj lingva spertiĝo. Ili proponas unusemajnan reciprokajn viziton, restadon en la partnerlandoj, tranoktadon ĉe familioj.

Ni jam korespondadas pri eventuala interŝanĝ-programo kun la gimnazio en Herzberg. Ĉu aliaj lernejoj, instruistoj interesiĝas? Se jes, bv. tuj anonci tion al mi.

4.4. Alvoko de Germain Pirlot pri la **nova enketo "Instruado de la lingvoj en Eŭropo"** por artikolo aperonta en belga fakgazeto por instruistoj: bonvenos informoj pri jenaj punktoj: frua lernado, lingva mergado, nombro da horoj semajne, denaskaj instruistoj aŭ diplomitaj pri lingvoj, metodo (pli da gramatiko kaj kvalito de la esprimado aŭ preferinde komunikado-rilatoj), amplekso de la interŝanĝoj, de lernejoj vojaĝoj, de uzado de novaj teknologioj, k.t.p.

La ĉ. 10-15 liniajn tekstojn li atendas ĝis la fino de majo al [gepir.apro@telenet.be](mailto:gepir.apro@telenet.be)

## 5. LERNMATERIALOJ, INSTRUHELPILOJ, LIBROJ

5.1. Ivan Kossey, subkarpata instruisto, vivanta nun en Germanio, publikigis la unuajn legaĵojn de siaj **Esperanto-lernolibroj por rusoj kaj hungaroj**. Temas fakte pri komplekso de lernolibroj, laborkajeroj kaj instrukciaro por instruistoj. La lernolibroj estas plurmediaj, entenas krom materialoj aŭdaj, vidaj ankaŭ karaokean aĵon por aktiva kunkantado.

La lernolibroj, kiel menciite, ankoraŭ ne estas definitivigitaj, sugestoj por plibonigoj, korektoj estas bonvenaj. Ĉiuokaze ili estas esplorindaj. Jen la ligoj, kie ili estas senpage elŝuteblaj:

<https://yadi.sk/d/D8O1qUpr3SgU47>

<https://yadi.sk/d/-5YZ-Nfm3SgTcR>

5.2. Anonco de **Peter Weide**: Mi volas aldoni, ke mia prezento de la **Esperanto-gramatiko** evitas la kutimajn lernolibrajn misprezentojn. Ĉe mi ne aperas la ideo, ke Esperanto havas pli da kazoj ol du, ne aperas la aserto, ke la vortordo estas libera (Libro la la tablo sur estas. ???), mi ne tradukas la prepoziciojn laŭvorte, sed klarigas, kiel oni uzas ilin. Komentojn pri aliaj versioj kaj pliajn informojn vi trovos ĉe :

<http://esperanto-gramatiko.saluton.dk/esperanto-gramatiko-superrigardo> .

5.3. En la **prononcara retejo** <http://forvo.com>, Esperanto nun havas 25.000 vortojn, kaj estas la 33-a laŭ grandeco tie. Se vi dubas pri prononco en ajna lingvo, provu uzi la URL-on <http://forvo.com/search/>.

Se vi havas tempon kaj mikrofonon, vi eĉ povas aldoni viajn prononcojn de vortoj en Esperanto aŭ via denaska lingvo.

5.4. La **Historia Vortaro** de B. Pabst kaj G. Neves estas plivastigita. Ĝi entenas la unuajn okazojn de Esperantaj vortoj de 1887 ĝis ink. 1889. Ĝi estas senkoste elŝutebla ĉe:

<https://mail.google.com/mail/u/0/?tab=wm#inbox/1621a7e4bd692ef7?projector=1&messagePartId=0.1>.

5.5. Anonco de Wolfgang Schwanzer [www.esperanto-buecher.de](http://www.esperanto-buecher.de)

Mi volas informi vin, ke ekde la 1a de februaro 2018 mi lanĉos **novan retan librovendejon** [www.esperanto-buecher.de](http://www.esperanto-buecher.de)

Ĝi estas pli profesi-aspekta kaj ebligas multajn funkciojn, kiujn nuntempaj klientoj volas uzi, ekzemple rigardon kaj tujan mendon per saĝtelefono.

Ĝi jam nun estas videbla en la reto, sed ankoraŭ ne tute preta. Mi tamen esperas, ke la plejmulto jam bone funkcias kaj mendoj eblas. Mi kore invitas vin, trafoliumi ĝin. Se vi trovas eraron aŭ malglatiĵon, viaj rimarkoj ĉiam estas bonvenaj. Mi estus dankema, se vi informus ankaŭ la membrojn de via klubo.

Se via klubo administras propran retpaĝaron, mi petas pripensi, ĉu vi povas meti ligilon al mia retvendejo. Ankaŭ mi havas la eblecon meti kelkajn ligilojn. Bv. informi min, se vi tion volas.

La ĝisnuna retvendejo [www.esperanto-buchversand.de](http://www.esperanto-buchversand.de) **daŭre restas** kaj estos regule aktualigita. Nur iom post iom mi ŝanĝos la enhavon.

## 6. KONGRESOJ

6.1. La **51-a Kongreso de ILEI** okazos inter 21-28 julio 2018 en Madrid, Hispanio, kun la 77-a Hispana Kongreso de Esperanto. Bazajn informojn pri la kongresoj, la kotiztabelojn, aliĝilon kaj mendilon por servoj vi trovos per <http://ilei.info> aŭ rekte ĉe <http://www.ilei.info/agado/Madrid2018.php>.

### 6.2. UK en Lisbono, Portugalio

Kadre de la 103a Universala Kongreso de Esperanto (28.07-04.08.2018) okazos Esperantologia Konferenco. La aranĝo havas kiel specialan temon la vivon kaj verkaron de Detlev Blanke (1941-2016), unu el la fondintoj de la tradicio de Esperantologiaj konferencoj kaj elstara aganto por la evoluigo de Esperantologio dum la lastaj kvardek jaroj.

Ni rekomendas ankaŭ partoprenon en la **Kleriga Lundo** (30.07) kaj en la **Tago de Lernado**, tradicie en mardo en la UK-programo (31.07)